CNT AIT FAI

INTERNACIA LABORIST-ASOCIO

# INFORMA BULTENO

NACIA KONFEDERACIO DE L'LABORO

IBERIA ANARKISTA FEDERACIO

REDAKCIA ADRESO: ESPERANTO-FAKO AV. DURRUTI 32-34
BARCELONO — HISPANIO

II-a jaro — 25 Aŭgusto 1937 — Numero 4

## LA ANARKOSINDIKALISMO K LA REVOLUCIA SOCIALISMO ALIANCIĜIS

En Hispanio ekzistas du grandajlaboristaj sindikataj organizoj C. N. T. k U. G. T. La unua estas anarkista k la alia socialista. Kvankam la konsisto de ambaŭ estas laborista, ili ĉiam intermalamikis. Ĉi interlaborista antagonismo, estigata k subtenata de la politikistoj, ĉiam portis egan utilon al la komuna malamiko — la kapitalismo k la ŝtato. Unuafoje ĉi antagonismo estis sufokita en 1934 dum la oktobraj okazaĵoj en Asturio, sed tio ne estis por pli longa tempo. En momentoj de mortdanĝero la klasinstinkto malgraŭ ĉio ekprotestas. Tio okazis ankaŭ dum la juliaj okazaĵoj pasintjare, kiam la faŝistoj provis ŝtatperforti por forpreni al la hispana popolo la liberon k la vivrajton. En sia impeta venko la unuiĝinta proletaro ne nur frakasis la faŝismon en la pli granda parto de Hispanio, sed ankaŭ cementis la bazojn de nova vivo por la laboristoj. Dum la batalo kontraŭ la faŝismo k dum la konstruo de la nova socia k ekonomia ordo la laboristoj de C. N. T. k U. G. T. agadis interkonsente. La granda espero de la socia k ekonomia liberiĝo varmigis ties korojn. Ties espero povus k povas efektiviĝi. Sed la politikistoj k ties partioj, ĉiam avidaj al povo, en la aspiro atingi la celon hezitas antaŭ nenio. Blindigitaj dela regemo, ili ne vidas, ke malunuigante la laboristaron k malgajnigante ties revoluciajn konkeraĵojn, ili kondukas la revolucion k la laboristaron al abismo. Estis momentoj, kiam ŝajnis, ke la politikistoj estas realigintaj sian pereigan taskon. Feliĉe la proletaro ankaŭ ĉi foje, kvankam kun ioma prokrasto, ekkomprenis klare la danĝeron, flankenigis la politikistojn k suriris la vojon al laborista unueco, kiun C. N. T. ĉiam montris kiel absolute necesa kondiĉo por la venko super la faŝismo k por la triumfo de la sociala revolucio. La viktimoj, kiujn C. N. T. donis k donas ne estis nefruktodonaj. La verva impeto de la laboristaro al unuiĝo estas evidenta fakto. Ĉi volo al unueciĝo igis la gvidantojn de U. G. T. alpreni la proponon pri unueco dum la batalo k la revolucio. La efektiviĝo de la laborista unueco hodiaŭ estas pli necesa ol iam ajn, k la unua paŝo al ĝia realigo jam estas enterprenita.

Komisiono konsistigita el reprezentantoj de ambaŭ sindikataj organizoj estis komisiitaj ellabori la bazon pri la kunlaboro inter ambaŭ sindikataj organizoj. Ĉi komisiono jam ellaboris la platformon, kiu estas aprobita de la Nacia Komitato de C. N. T. k la Plenum-Komitato de U. G. T. k estas konfirmenda de la kongresoj de ambaŭ organizoj.

La reprezentantoj de la Nacia Komitato k la Plenum-Komitato ellaboris la sekvantan platformon:

1. C. N. C. k U. G. T. konkordas ne plu kritiki per sia propagando, la ideojn k la taktikon de la konkordantaj organizoj.

2. C. N. T. k U. G. T. ne rekonas aliajn organizojn ol C. N. T. k U. G. T.

3. C. N. T. k U. G. T. priatentas la plenan liberon de ĉiu laboristo koncerne lian elekton membri al unu el ambaŭ sindikataj organizoj. En fabrikoj, laborejoj, minejoj kc. kiel nuraj oficialaj sindikataj dokumentoj estos la laboristaj membrokartoj de C. N. T. k U. G. T.

4. Ambaŭ organizoj devigas sin ne akcepti por membro tiun laboriston, kiu estas eksigita de unu el la du organizoj pro malmoraleco aŭ neplenumo de la organizaj decidoj.

5. Ili decidis ne akcepti en siaj vicoj ankaŭ sindikatojn, kiuj forlasis C. N. T. k U. G. T. k volas ree aliĝi al unu de la du organizoj, sen sondi la organizon al kiu ili antaŭe membris.

6. Estos konsiderata kiel mallojala ago rilate al la starigita konkordo ĉiu perforto celanta devigi k-dojn de unu organizo aliĝi al la alia.

7. U. G. T. k C. N. T. interkonsentas konvinkigi siajn membrojn ne plenumantajn kunajn decidojn plenumi ilin.

8. Por vivigi ĉi principon pri reciproka priatento, kiu estas necesa kondiĉo por la plipostaj interrilatoj C. N. T. k U. G. T. decidas la fondon de Nacia Komitato Interligila konsistigota el po tri reprezentantoj de ĉiu organizo. Ĝiaj funkcioj estos:

*a*) Kunveni almenaŭ unufoje semajnon.

*b*) Esti fidela plenumanto de la alprenitaj decidoj.

*c*) Fondi en ĉiu urbo k vilaĝo Komitaton Interligilan inter la lokaj sindikatoj de ambaŭ sindikataj organizoj, kies tasko estos plenumi la decidojn de la Nacia Komitato Interligila k transsendi al la lasta la lokajn opiniojn k iniciativojn.

*d*) Pritrakti ĉiujn problemojn, kiujn necesigas la cirkonstancoj k kiuj ne estas enmetitaj en la programoj de ambaŭ organizoj.

9. La estiĝontaj konfliktoj inter la sindikatoj de ambaŭ organizoj estos solvataj de la Nacia Komitato Interligila.

10. La Nacia Komitato Interligila proponos al la Naciaj Komitatoj de ambaŭ organizoj la sankciojn aplikendajn al la sindikatoj, kiuj ne plenumis ĝiajn decidojn.

11. La alprenotaj decidoj por esti validaj devas esti subskribitaj de la Naciaj Komitatoj de ambaŭ organizoj.

12. La Nacia Komitato Interligila deponos al la Naciaj Komitatoj de C. N. T. k U. G. T. la decidojn, kiuj laŭ ĝia opinio estas alprenendaj por la solvo de la problemoj, kiujn la realeco necesigas.

*La Nacia Komitato de C. N. T.*

*La Plenum-Komitato de U. G. T.*

# LA HISPANAJ ANARKISTOJ

La angla profesoro Allison Peers publikigis en la gazeto "Manchester Guardian" (30-7-1937) studon pri la hispana anarkismo. Parton de ĝi ni trovas represenda.

Tiuj, kiuj konis malmulton pri la Hispanio antaŭe la aktuala konflikto ŝajne kredis, ke la Anarkismo en ĉi lando estas jusa k ke ĝia rapida kreskado ŝuldiĝas al la cirkonstancoj de toleremo de la anti-milito, aŭ resume kiel movado, kiu ekĝermis antaŭ 5-6 jaroj, kiu donis sian frukton, kvankam kun ritmo iom akcelita dum la jaroj de la Respubliko. Kontraŭe al ĉi ĉio ĝi estas la plej malnova en Hispanio el la revoluciaj fortoj, ĉar la Socialismo, el kiu ĝi devenis, ĝis antaŭ nelonge ne estis tolerata en ajna senco de rekta agado k se dum la monarkio ĝi bruis per la kulpigo pro krimoj pli ol dum la komenco, ŝuldiĝas al la interkonsila politiko de ties gvidantoj.

La Anarkismo establiĝis en Hispanio dum la tumultoplenaj jaroj antaŭe k poste la revolucio en 1868 k la detroniĝo de Isabel II. La malpaciĝoj, kiuj okazis dum la nelongedaŭra regtempo de Amadeo, la kantona movado, efike sufokita, sed kun tre grava populareco, la ideoj malcentrigaj k federalaj de Pi k Margall k ties kolegoj (kiuj atingis starigi konstitucion, dividante Hispanion en 17 aŭtonomaj regionoj), la sinsekvo de malkvietiĝoj, kiuj determinis la vivon de la unua Respubliko: ĉi ĉiuj kondiĉoj estis idealaj por la florado de la Anarkismo.

En 1873, tri jaroj antaŭe la morto de Bakunin, ĝi kalkulis kun 300.000 societanoj en 270 lokoj, el kiuj pli gravaj estis Barcelono, Jerez k Cadiz. Iom post la restariĝo de Alfonso 12 ekkomencis serio da akcidentoj k atencoj, pri kiuj la eksterlanda legantaro apenaŭ rememoros k malpli rilatigos ilin al iu politika platformo. Kelkaj el ili estis la atenco kontraŭ Alfonso 12 en 1886 la serio da akcidentoj en Barcelono dum 1890, kiuj estigis la leĝon pri la subpremado kontraŭ la Anarkismo en 1894, la mortigo de Canovas el Castillo en 1897, la ĝenerala revolucia striko en 1902, la atenco kontraŭ Maŭra en 1904 k la multnombraj akcidentoj okazigitaj per manbomboj dum la posta jaroj ĝis atingi al "la tragedia semajno" en 1909, kiu estis tiel fama en Barcelono. Dume la vera Anarkismo kombiniĝis kun pasia movado kun ideologio simila k celo identa en kelkaj rilatoj, nomata Sindikatismo.

Kiam fondiĝis la unua Sindikatista Asocio Laborista, ĝi troviĝis kun la opozicio de la anarkistoj k la kapitalistoj, kiuj dum 5 jaroj subtenis konstantan militon inter si k la Anarkista Federacio Laborista.

Sed la kreskado de la Socialismo k la formiĝo de U. G. T. unuigis la du malcentrigajn movadojn k kiam en 1910 la sindikatistoj fondis sian C. N. T., la plimulto el la anarkistoj aliĝis al ĝi, retenante tamen sian propran organizon F. A. I., kiun, fidela al siaj principoj k sinteno, ili konservis kiel sekreta forto k senleĝa, destinita por la pli pura formo de la Anarkismo. Dank al la helpo de C. N. T. kun ĝia konstanta propagando k efika gazetaro k ĝiaj tegaj alvokoj al la rekta agado la anarkista aktivo disvolviĝis pli bone ne nur dum la dua respubliko, sed dum pli ol kvarona centjaro. Estis la anarko-sindikatistoj, kiuj minacis per revolucio k eksigis la dŭ elektitajn ministrojn ne nur en 1934, kiam formiĝis la unua registaro de la dekstra centro, sed ankaŭ en 1931 post la unua respublikana baloțado. Ili estis, kiuj instigis la strikojn k la ribelojn dum la somero 1931 k en kombino kun la komunistoj elkateniĝis serioze la unuan revolucion sub la respubliko en Januaro 1933. Ankaŭ estis la anarko-sindikatistoj respondecaj pri la strikoj, kiuj paralizis dum kelkaj tagoj Barcelonon, Zaragozon, Seviljon k ĝis Madrido en Decembro 1933.

* * *

Pro tio ke Socialismo estis ĉiam pli forta en Madrido, tradicia loko de la hispana centrigo dum pli ol 4 centjaroj, la Anarkismo k la Sindikatismo trovis atmosferon pli taŭgan en Barcelono, kie dum pli da tempo la opozicio estis pli forta komence. Pri ĉio kion la Anarkismo defendas por la malcentrigo k la aŭtonomio, la katalunoj demonstris ĉiam tian simpation. "Ĉe ĉiu kataluno ekzistas anarkisto", skribis la granda poeto Juan Margall en sia studo pri la kataluna karaktero. Sed Margall, kvankam progresemulo, estis fervora religiulo k en la politiko nek almenaŭ respublikano. Neniu do surpriziĝus pli ol li, trovi, ke liaj deklaroj estas interpretataj en la senco, ke la katalunoj apogis la anarkistojn en ilia malagnosko de dio, patrio, ŝtato, registaro, geedzo, familia kunvivo. Li volis diri, kiel ties kunteksto indikas, ke liaj samlandanoj, loĝante en la montaroj k apud la marbordoj, ĉiam havis egan pasion al la libero, k aparte deziregis dum sia tuta vivo la malcentrigon de Hispanio por esti mastroj de sia mema domo.

Fine ili atingis ĉi deziron ĝis certa punkto dank' al la Respubliko, kiu cedis al ili la aŭtonomion en 1932.

Sed la anarko-sindikatistoj, kiuj multe antaŭe 1932 enradikiĝis en Barcelono, ne havis intereson en tio, kion oni nomas "burĝeca aŭtonomio". Ĉe la alveno de la respubliko ilia plej bona presorgano "Solidaridad Obrera" proklamis malkaŝe sian opozicion kontraŭ la kataluna naciismo k dum la unuaj 5 tagoj de la deklaro de la nova reĝimo diris, ke "estis danĝero, kiu povus rezulti en grava minaco" por la demokratio. Poste ĝi aldonas, ke ili mem oponus sin al la starigo de landlimoj inter la katalunoj k iliaj fratoj de la aliaj regionoj, ĉar la landlimoj estas la plej grandaj malamikoj de la organizitaj laboristoj. "Memoru, ili diris al la ĉefo de la "romantikaj naciistoj", post la intertrakto pri la katalunia aŭtonomio, memoru, urbano Macia, ke la laboristoj, kiuj, kiel vi diras, al vi donis siajn voĉojn, ne donis, por ke vi dividu ili de ties fratoj. C. N. T. vivas en la koro de ĉiuj hispanaj laboristoj k povas etendi manojn tra ĉiuj landlimoj por brakumi ĉiujn laboristojn de la mondo".

Ĉi-tiu estis ĝia sinteno en 1931 k ĝin C. N. T. subtenas en 1937. La anarko-sindikatistoj estis atestantoj de la triumfo de la aŭtonomistoj, kiel estis de la revolucio en 1931, sed ili konsideris, ke neniu el ambaŭ havus iun signifon, se venos ilia revolucio k se atingos imponi en la lando sian tipon de aŭtonomio. La proletan reĝimon, kiun ili atingis starigi en Katalunio depost la fiasko de la faŝista ribelo de 19 de Julio 1936, ili konsideras kiel komenco de pli bonaj realigoj, sed ne povis daŭrigi sian konstruan laboron ĝis plenamplekso, kiun ili deziregis, pro la aliaj du grupoj, la maldekstreco k la sintezaj grupoj socialistaj k komunistaj, kiuj havas similajn ambiciojn.

Kion la estonto al ni portas, ekster la konfliktoj dum multe da tempo, estas malfacile antaŭdiri. Supraĵe la pozicio de la Maldekstreco strebas similiĝi al la du respublikanaj partioj moderigitaj de Popola Fronto. Sed oni ne devas forgesi tion, kion reprezentas la Statuto pri la Aŭtonomio de 1932, aŭ por diri pli bone, iom pri la origina

redakcio de la Statuto antaŭ ol esti kripligita de la parlamento (Cortes) k ke dum la referendumo de Aŭgusto 1931 voĉdonis ne malpli ol 99 elcento k 80 elcento decidis favore al ĉi Statuto. Tion sen ia dubo la anarkosindikatistoj priatentis, k malgraŭ ke pluraj el la voĉdonintoj estos forestintaj aŭ malaperintaj, ekzistas ĉiam la eblo okazi popola leviĝo grandskala... Sajnas probable, ke en okazo de venko de Popola Fronto sekvos dua civila milito, establiĝonte ŝtato bazita sur progresemaj socialistaj ideoj kun aŭtonomaj rajtoj por la regionoj, kiuj tion deziras, k fine oni retroiros al simila stato, kiu superregis dum la aŭtuno 1933 antaŭ la demisio de Azaña, kiu (demisio) povigis la unuan respublikanan centralan registaron.

Profesoro ALLISON PEERS

# LA LONDONA FARSO K LA PROLETARO

Neniam en la historio de la popoloj oni trovos tiel malnoblan k cinikan farson kiel tiu nun ludata en Londono. Ĝi estas vera marĉandado por la subteraj riĉaĵoj de Hispanio. La reprezentantoj de la diversaj imperialismaj potencoj ne plu penas maski siajn planojn. La vortoj "libero", "demokratio" aŭ "ruĝula minaco" ne plu estas uzataj. Oni jam malkaŝe parolas pri kupraj, plumbaj ktp. minoj. Por la imperialismaj potencoj la problemo estas simpla: al kiu apartenos la minoj post la finiĝo de la milito.

La sola punkto, rilate al kiu la opinioj de la imperialismaj ŝtatoj koincidas, estas frakasi la hispanan proletaron. Ankoraŭ ekde la komenco de la milito Anglio prenis la flankon de Franko. Ĉiuj ĝiaj manovroj estas direktataj por lia utilo. Ĝia sinteno estas facile klarigebla, se oni scias, ke la pli granda parto de la hispaniaj minoj apartenas al anglaj kapitalistoj.

Kiom multe erarigis la komunista partio, asertante, ke la hispana proletaro batalas por defendo de la privata posedo! Tamen la anglaj financistoj ne estas facile trompeblaj. Ili scias bonege, ke 80 elcento de la armitaj antifaŝistaj milicanoj estas laboristoj apartenantaj al C. N. T. k U. G. T. kiuj kolektivigas la teron, kontrolas la kolektivigitajn fabrikojn k kiuj post la finiĝo de la milito konservos sian armilaron por defendi k plivastigi siajn revoluciajn konkeraĵon. Konsiderante tion, la kapitalistoj konscias, ke la Valencia registaro ne prezentas sufiĉan garantion por la kapitaloj akumulitaj en Hispanio.

La disputoj, kiuj okazas en Londono ne celas sekurigi venkon de unu el la du flankoj. Ne. Ties celo estas protekti la interesojn de la kapitalistoj.

Anglio k Francio insistas pri la retirigo de la volontuloj por flankenigi tiel Franko'n el sub la influo de Hitler k Musolini. Tio ebligos ja arbitron k paciĝon inter la du frontoj.

Por atingi ĉi ĉion oni minacas fermi la francian landlimon. Italio k Germanio ja scias bonege, ke la libera aĉeto de militmunicioj ebligos al la antifaŝistoj armigi por mallonga tempo 200-300.000 milicanojn k tiel gajni la venkon. Plie Germanio k Italio daŭrigas la disputadon por profiti tempon liveri al Franko sufiĉan militmaterialon, por ke li povu venki sen la rekta helpo de Anglio, ĉar tio ebligos al ili akiri ekskluzive por si la subterajn riĉaĵojn k plie okupi strategiajn poziciojn por nova milito.

Unuvorte: Londono estas la kampo de la diplomata milito de la kapitalismaj potencoj, kiuj riskas okazigi novan mondmiliton.

K dum la diplomatoj, eŭnukoj de la kapitalismaj potencoj, plenumas sian taskon, la laborista klaso inertas. Sed estas tempo por fini ĉi situacion. La kapitalismaj ŝtatoj prononcis sian parolon. Nun la internacia proletaro devas eldiri sian parolon. Ne sufiĉas ja nur kolekti monon. Tio estas la minimuma. Estas necesa la entrepreno de energia kampanjo en ĉiuj landoj, apliki ĉiujn rimedojn, kiujn disponas la proletaro por finigi la komedion "Neinterveno", kies finalo povas esti tragedia por la hispana proletaro. La batalo de la hispana proletaro estas la batalo de la internacia proletaro. K la internacia proletaro povas triumfigi la hispanan revolucion. Ĝi ne devas priatenti la ĉantaĝon de la politikistoj, laŭ kiuj la energia agado de la internacia proletaro okazigos la militon. Ne la proletaro okazigos ĝin, sed la kapitalistoj k la imperialistoj, kiuj leviĝas unu kontraŭ la alia. La triumfo de la hispana labora popolo influos konsekvence en ĉiuj landoj k prezentos la plej firman garantion por la Paco.

# APELO AL LA UNIVERSALA KONSCIENCO

La Hispana Ligo pri la Rajtoj de la Homo direktis al la universala konscienco la sekvantan apelon:

La Hispana Ligo pri la Rajtoj de la Homoj apelas ankoraŭfoje al la universala konscienco, eble tro malvigla, tro dormema k indiferenta, k petas malhumiliĝe ĉiujn organizojn havi por standardo la idealojn de Libero, Paco, Justo, Kulturo, Laboro k Frateco, la maksimuma helpo morala k materiala por Hispanio sanga k mokita, kiu hodiaŭ oferas sin k mortas por malakceli la triumfon de la barbaroj de la 20 centjaro.

Amikoj, kamaradoj, fratoj el ĉiuj landoj, konigu la gloran k tragikan situacion de malnova Hispanio, la patrino de la civilizoj k ĉiama kunulino de la Progreso. Por neniigi ĉi noblan faman Hispanion unuiĝis la perfiduloj enlandaj k la imperialistoj eksterlandaj, la hieraŭaj reakciuloj k la hodiaŭaj egoistoj, la antikvaj fanatikuloj k la modernaj perversemuloj. La unuaj k la aliaj blufis sur la spiritan superon k tiel Hispanio fariĝis scenejo de neaŭditaj tragedioj, de teruraj krimoj k kruelaj turmentoj.

La ribeluloj piedbatas armilforte la liberan rajton de la lando regi sin en formo k maniero, kiun preferas la popolanaro. La eksterlandaj invadantoj ne priatentas la principojn de la Internacia Rajto k iuj nacioj militas kontraŭ ni sen ia ajn deklaro, kun malpravigebla k malnobla aspiro.

Oni volas forpreni al ni la sendependon, la liberon k la rajton al civiliza vivado. Konita estas la krima aspiro de la hispana k internacia kapitalismo malplialtigi la salajrojn de la hispana proletaro k ĝin sklavigi. Por real igi ĉi monstrecan intencon oni bombardadas aere k mare la malfermajn urbojn k, kiel estas la okazo de Madrido, oni ordonas al grandkalibra altilerio pafadi super domoj k stratoj malproksimaj multajn kilometrojn de la tranĉeoj k la militlokoj.

Tamen spite al la nigra teruro de tiom da angoro k tiom da malespero Hispanio ankoraŭ levas supren la bluan torĉon de la iluzio. Ĝi batalas ja pro justa celo k la maljusto ne povas forpreni ĝin al ni.

Ni batalas ne nur por nia sendependo k nia Respubliko, por nia pano k por la digno de la labora popolo, sed ankaŭ por pli bona vivo. K la solidareco de la liberaj k dignkonsciaj homoj ne devas manki, ĉar en danĝero estas la rajto de la homo de Hispanio k de la Tutmondo.

# KRONIKO

Okaze de la konfirmo de la alianco inter la du sindikataj organizoj C. N. T. k U. G. T. la diversaj anarkistaj organizoj k grupiĝoj sendis salutajn telegramojn al la sekretarioj de la du organizoj M. R. Vazquez k F. L. Caballero, kiuj efektivigis la delonge sopiratan aliancon. La Lokala Federacio de la Liberecana Junularo en Madrido sendis la jenan telegramon: "En la nomo de 50.000 junuloj batalantoj k laboristoj ni entuziasme salutas vin pro la realigo de la Revolucia Laborista Alianco C. N. T. k U. G. T.". La Liberecana Junularo de Levante (Valencio): "Estimataj k-doj, en la nomo de 47.000 liberecanaj junuloj de Levante ni salutas vin frate en ĉi momentoj historiaj, en kiuj vi interpretis juste la sopirojn de la hispana laborista klaso, subskribantê pakton pri unueca agado inter niaj karaj sindikataj organizoj U. G. T. k C. N. T. Kontraŭ la faŝismo! Militon sen kazerno! Por la sociala Revolucio! Vivu la unueca revolucia agado de la proletaro! Vivu U. G. T.! Vivu C. N. T.!". Telegramon kun proksimume saman tekston sendis ankaŭ la Lokala Federacio de la Liberecana Junularo en Barcelono en la nomo de 15.000 anoj.

* * *

La dua kongreso de la antifaŝistaj verkistoj por la defendo de la Kulturo okazigis siajn lastajn kunsidojn en Parizo, proklamante rezolucie: I. Ke la Kulturo, kiun ili defendas havas por principa malamiko la faŝismon. 2. Ke ili estas pretaj batali per ĉiuj rimedoj, kiujn ili disponas, kontraŭ la faŝismo. K ili deklaras batali kontraŭ la faktoroj de la milito. 3. Ke dum la aktuala milito, kiun la faŝismo okazigis kontraŭ la Kulturo, la demokratio, la paco k ĝenerale kontraŭ la feliĉo k bonstato de la homaro, nenia neŭtraleco estas ebla, nek pensebla. K fine la antifaŝistaj verkistoj direktas solenan alvokon al la verkistoj de la tutmondo fiksi senprokraste sian pozicion antaŭ la minaco, kiu ekpezas super la Kulturo k la Homaro.

* * *

Antaŭ du monatoj inter la multaj aliaj P. O. U. M.—anoj estis arestitaj la publicistoj Andres Nin, Gorkin k David Rey kiel gvidantoj de la marksista organizo P.O.U.M. En la komenco de Agusto la Ministerio pri la Justo en Valencio diskonigis, ke Andres Nin, kiu estis translokiĝigita al Madrido, malaperis kune kun la gvardianoj eskortantaj lin. Tio estigis profundan indignon k energian proteston inter la laboristaj medioj en Hispanio, kiel same en eksterlando. Ĉar Andres Nin estis konata kiel unuagrada publicisto k aktiva antifaŝisto. Rilate al la sorto de Nin la gazeto "The Times" (de 7 de Aŭgusto) atentigas: "Laŭ privataj sciigoj estas enigmo pri la "forkuro" de Andres Nin, gvidanto de P. O. U. M. Li estis efektive murdita de liaj politikaj malamikoj. Nin estis forprenita de armita grupo dumnokte antaŭ kelkaj semajnoj el la karcero de Madrido k ekde tiam lia restado estis vualita de mistero. Persiste cirkulas la onidiro, ke lia kadavro estis trovita iom poste en la ĉirkaŭoj de Madrido".

La gazeto konkludas: "Nin k lia partio estis la malamikoj en Hispanio de la Moskva komunismo, k la lasta siaflanke kun la helpo de la Moskva gazetaro k la komunista Internacio akuzis ilin kiel faŝistaj agentoj. Nin k aliaj gvidantoj de P. O. U. M. deklaris, ke la Moskva influuloj mobiliziĝis por prezenti falsajn akuzojn pro spionaĵo kun la celo detrui ilin". La Pariza "L'Oeuvre" (de 7 de Aŭgusto) finklarigas la aferon, tuŝitan de la Londona "The Times": "Laŭ fidindaj informoj, la fondinto de P. O. U. M. estis viktimo, kiel same liaj eskortantoj de unu akcidento morta en la momento de lia translokiĝigo. La tuta grupo estis falĉita per mitralilo kiu pafis el aŭto dum lia eliro el la Madrida karcero, kie Nin estis detenita."

* * *

Dum la lastaj kelkaj semajnoj la Hitlera polico Gestapo detenis areste plurajn social-demokratojn k sindikistajn batalantojn. Inter la detenitoj figuras la eksprezidanto de la germana fervojista sindikato Scharfschwert, la direktoro de la Germana Ĝenerala Konfederacio de la Laboro Schlimme. Al ili oni atribuas la distribuon de broŝuroj antiregistaraj, per kiuj ili instigas al la restarigo de la socialista sindikatoj, verdikte malfondigitaj en 1933.

* * *

La Nacia Federacio de la Ĉinaj Virinaj Asocioj direktis alvokon al ĉiuj virinoj de la mondo, denuncante la invadon de Ĉinio fare de la japanaj militistoj. Interalie la manifesto diras. "La ĉina popolanaro batalas por rekonkeri sian teritorion. Ni batalas ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por la internacia justo, k la kolektiva sekuro. Ni petas ĉiujn virinojn de la mondo doni al ni sian moralan apogon en la nomo de la justo k de la humaneco".

* * *

La eminenta rusa ekonomiisto E. Varga donas en "Pravda" (n-ro 209) detalan raporton pri la pormilita pretigado de la faŝistaj ŝtatoj Germanio, Italio, Japanio, kiel same de la demokratiaj Francio, Anglio k Usono. Li finas sian artikolon per la konkludo. "La burĝaro, malgraŭ sia inklino al patriotismaj frazoj, klopodadas kiel eble malpli elspezi el siaj riĉaĵoj pri la pormilita pretigado k eĉ gajnas egajn monsumojn dank'al la ŝtato, dum la tuta ŝarĝo de la pormilita pretigado ekkuŝas sur la laboristaj amasoj. Ju pli pliiĝas la ŝtata pretigado pormilita despli malboniĝas la situacio de la laboristoj, kiel tion klare elpruvas la ekzemploj en Japanio, Germanio k Italio".

* * *

La angla informservo "Uik", apogante sin sur deklaroj de militeksperto ĵus reveninta el Germanio, asertas, ke ne ĉio bonstatas en la gernana "reichsvere". La reichsvereanoj estas malkvietiĝantaj pro la timiga nombro de memmortigoj k dizertantoj konstatataj dum la lastaj 6 monatoj en la germana armeo. Pri la memmortigoj oni informas nur tiam, kiam ili jam estas konataj k la nura oficiala klarigo aperas la nedesigebla amo. La nombro de la dizertantoj en la germana armeo estas tiom granda, ke oni mortpafas. Tiel ekz. Ia de Julio 7 dizertintoj estis mortpafitaj en la malliberejo Naidorfvedaŭ en Dusseldorf. Ekster tio tamen la nombro de la dizertintoj aktuale estas almenaŭ tiom granda kiom en 1917. La ĉefkaŭzo de ĉi dizertoj, informas "Uik" aperas la milittimo k aparte la timo esti sendita al Hispanio.

* * *

Ni ricevis detalan leteron de franca k-do, kiu interalie skribas: "I. B. akuzis, ke Bilbao falis pro nesufiĉa solidaro de la internacia proletaro. Jes, k-doj, vi estas pravaj. Dum vi batalas energie, abnegacie kontraŭ la faŝismo, kontraŭ nia komuna malamiko, Francio subskribis kontrakton kun Hitlerio. Germanaj k italaj komercŝipoj inundas la franciajn havenojn. Francaj havenlaboristoj malŝarĝas germanajn k italajn komersŝipojn, dum aliaj ŝipoj ŝarĝas en Hamburgo militmaterialon por la hispanaj faŝistoj. Dum kompare mallonga tempo Francio liveris al Hamburga firmo preskaŭ 2000000 tunojn da mineralo por fero. U. S. S. R. liveradas teroleon al Hamburga firmo. Kie troviĝas Hamburgo? En la nuna momento mi demandas min: Kion entreprenis la

Laborista Internacio, la Sindikata Internacio, la Tria Internacio k la sekcianoj de ĉi organizo el la diversaj landoj? La Laborista Internacio I. O. deklaras: Nia simpatio estas kun vi, hispanaj laboristoj, hispana popolo!". Vi ne bezonas simpation, nek kompaton. Armilojn k malfermitajn landlimojn vi bezonas!...

* * *

Lastatempe en Germanio estiĝas tre forta antifaŝista movado malgraŭ la teroro. Registriĝas pli oftaj antifaŝismaj manifestiĝoj, kiuj simple frenezigas la hundaĉojn de Hitler. Tiel ekz. en unu regiono de okcidenta Germanio antifaŝistaj junuloj monkolektas ĉiutage 15-20 markojn, kiujn ili sendas al Hispanio. Pliaj Hitleranaj junuloj stratpurigistoj forvendas siajn pli karajn havaĵojn por sendi la monenspezojn al Hispanio. Tri junuloj el Sarre, eksciante, ke ili estos baldaŭ rekrutitaj kiel soldatoj, trapasis neleĝe la landlimon k sukcesis alveni Hispanion, kie soldatiĝis al la Popola Armeo. Oni ekscias pri multaj analogaj ekzemploj en multaj aliaj industriaj regionoj. La soldatoj el unu Berlina kazerno estis invititaj fariĝi volontuloj por Hispanio. K nur 14 soldatoj prezentis sin. En la korto de fabriko en Wuppertal estis fiksita landkarto pri Hispanio k ĉiutage oni indikis pingle la frontojn laŭ la informoj, Ĉiumeztage multnombraj laboristoj amasiĝis antaŭ la landkarto, interkomunikante k diskutante la lastajn novaĵojn diskonigitajn de la germanaj radio-stacioj. Ili iel ekkonis, ke Franko ne progresas antaŭenire. Iun tagon la linioj de la Madrida fronto aperis kovritaj per slipo kun surskribaĵo: No pasaran!

* * *

8 de Aŭgusto paroladis en Valencio la ĉefo de la kataluna komunista partio P. S. U. C. s-ro Comorera, kiu diris, ke "Katalunio komence havis difektojn, ke la milito komencis kun kelkaj tribanoj, kiuj konfiskis ŝarĝaŭtomobilojn, dirante, ke iras por forpreni Zaragozon". "Solidaridad Obrera", la plej granda k plej legata gazeto en Hispanio inde respondis jene: La tribanoj, kiuj konfiskis ŝarĝaŭtomobilojn, dirante, ke iras forpreni Zaragozan, plenumis ordonon de la Registaro, kiu sendefenda antaŭ la perfido de la militistoj alvokadis per la radio, telefono, per la gazetaro k ĉiel la laboristojn, kiujn poste oni nomis nekontrolitaj, k oni malfermis al ili la parkojn k petis ilin kun ploraj okuloj preni armilojn k iri venki la ribelon. Ĉi tribanoj alvenis solaj, solsolaj, ili pro sia mema impulso k tiu de niaj k-doj trapasis Caspe k trapasis Belchite k restis je unu kanonpafo de Pilar. K ili ne povis ĝin kanoni, ĉar ne konfiskis sufiĉajn ŝarĝaŭtomobilojn por la transporto ĉar ne prenis la necesajn, absolute nepermeseblajn. K ili konfiskis malmultajn, malmutegajn ŝarĝaŭtomobilojn, ĉar pro la rapideco k la entuziasmo k la decido ili forgesis demandi ĉi sinjorojn simpatiajn, ĉu alili plaĉis, ke la laboristoj estis agantaj. La patrinoj, kiuj en la unuaj momentoj de la batalo vidis siajn filojn, vibrantajn pro entuziasmo, iri aniĝi al la tiamaj gloraj kolonoj k hodiaŭ "triboj" laŭ iuj, kian impreson ekhavos pro la opinio de unu sinjoro, kiu en tiuj momentoj ne sentis sin sufiĉe "sovaĝa" por iri fronte al la kugloj. La homoj, kiuj de la tribuno dediĉas sin kalumnii la "tribanojn", kiuj en la unua momento oferis ĉion kion posedis por la triumfo super la faŝismo, ne indas je kia ajn konsidero flanke de la antifaŝista proletaro.

* * *

Iu radio-stacio diskonigis la komunikon, ke la norvega komitato komisiita elekti kandidaton pri la Nobel-premio por Paco, decidis unuanime ĉi premion al la angla ministroklaŭno Eden. La priparolata komitato plie insistis antaŭ Eden akcepti ĉi honoron. Tamen ĉi komuniko ankoraŭ ne estas konfirmita publike de la prezidando de la komitato pri Nobel-premio, profesoro Stang. Ni ne kredas, ke tio okazos. Estas pli kredeble, ke Musolini mem prezentos al sinjoro Eden premion por paco. Tiel pli decas. Ambaŭ ja estas elpruvitaj kriptogamaj pacifistoj...

* * *


Aperis postmorta eldono de la libro "Musolini al la konkero de Balearoj", libro, kiun la pereinta k-do Kamilo Berneri ne povis aperigi k super kiu li laboris intense. La libro entenas abundajn kopiaĵojn de valoraj dokumentoj, kiuj malkovras la manovrojn de la itala faŝismo en ĝia plano almiliti la militbazojn de Mallorca por la realigo de siaj imperialismaj aspiroj absorbi la eŭropajn demokratiajn landojn. La libro, 180 paĝa, estas eldono de la liberecana eldonejo "Tierra y Libertad".

* * *

Dum la kunveno de la Nacia Komitato de C. N. T., okazinta 14 an de Aŭgusto en Valencio, la sekretario raportis pri la intervidiĝo, kiun li havis kun la prezidanto de la Respubliko laŭ la decido de la plenkunvenode la Regionaj Sindikatoj. Li informis la prezidanton de la respubliko, ke C. N. T. plu subtenas sian sintenon rilate al la adoptita linio pri pli rapida gajno de la milito. Poste estis tralegita la interkonsenton ellaboritan de la Federacio pri la martransportoj ĉe U. G. T. k C. N. T., kiu estis plene akceptita. Ankaŭ estis legita la proponon de la sveda sindikata organizo S. A. C. akcentanta ampleksan agadon de la internacia proletaro solidare al la hispana revolucia milito.

* * *

Al nia alvoko alsendi librojn por la esperantistaj milicanoj, kiuj batalas ĉe la frontoj por la liberigo de la internacia proletaro respondis senprokraste, grandanime k plenovole S. A. T., alsendante 25 librojn. Ĉi donaco de S. A. T. estas dua. Antaŭe ĝi alsendis preskaŭ 30 librojn. Niaj ĉefrontaj esperantistoj multon ŝuldas al S. A. T. Ili ja povas utiligi la ripozan tempon per interesaj esperantaj legaĵoj. Ekster tio tamen ni volas rimarki, ke ili dum la mortzumado de tankoj, aeroplanoj k maŝinpafiloj silentas, ne nur legetas, sed ankaŭ aranĝas improvizitajn esperanto-kursojn. Ni jam ricevis el la fronto leterojn de ekesperantistoj, kiuj ĉe la fronto eksciis pri Esperanto k kiuj petas esperantaĵojn. En la nomo de la ĉefrontaj k-doj esperantistoj ni dankas k sennaciule salutas S. A. T. pro ĝia donaco!



— Kio estas tio tiel nigra?
— Estas la neinterveno, kiu preterpasas. . .

# LA SITUACIO EN KATALUNIO

Tuta Katalunio nune travivas frenezecan teroron. La kataluna komunista partio P. S. U. C., profitante la cirkonstancojn, ordone direktadas de la veluraj kancelarioj atakon kontraŭ la revoluciaj konkeroj k kontraŭ la homoj, kiuj ilin surbarikade akiris.

P. S. U. C. estas la instrumento elektita de la superaj komandantoj de la komunista partio por alfronti k kontraŭbatali niajn organizojn C. N. T. k F. A. I.

Depost la provo ekstermi P. O. U. M., P. S. U. C. kredas, ke la tuta montaro estas el markotoj k intencas ripeti ĝin pri niaj organizoj. Sed kion P. S. U. C. atingis pri tiu organizo el entuziasmaj junuloj, tamen ankoraŭ ne sufiĉe firmaj, ĝi atingos neniam pri niaj potencaj organizoj, kies principoj fariĝis sango k karno por la hispana proleta popolo. La ruĝa diktaturo, la diktaturo de superflua ruĝulo-tirano, neniam stariĝos en Hispanio, malgraŭ la ĉiuspecaj manovroj.

Cele realigi monstraĵojn oni instalas konstraŭ ni bateriojn, entreprenas kontraŭ niaj organizoj ĉiuspecajn malnoblaĵojn k fiagojn.

Multaj niaj k-doj estas enkarcerigitaj k aliaj murditaj. En Puigcerda oni fusilmortigis 6 k-dojn k en Tortosa II. En Barcelono estas detenitaj 350 niaj k-doj. El ili 80 estas procesigataj. Pli ol 100 eksterlandaj k-doj estas arestitaj k akuzitaj kiel nedokumentitoj sen konsideri, ke ili ĉiuj batalis ĉe la diversaj frontoj kontraŭ la faŝismo.

La procesoj komenciĝas surbaze de denuncoj, la plejmulto el kiuj estas formulataj de faŝistaj elementoj, embuskitaj malantaŭ la karto de iu pseŭdo revolucia organizo. Tiel ekz. en Riudearenas (Gerona) la polico praktikis traserĉon en unu domo de tiaspecaj denunciantoj k trovis surtable kaŭĉukan sigelon de la Patriota Unio.

En la karcero de Vich estas arestitaj 70 niaj k-doj. Inter la procesigatoj troviĝas k-do, kiu estas akuzata pro mortigo de religiulo. En Granoller oni arestis 10 niajn k-dojn, kiuj plenumis oficialajn oficojn. Ĉiuj ili estas prosesigataj je dispono de la speciala juĝisto Rodriguez Dranget. En Igualada oni arestis la 3 municiajn konsilantojn, akuzante ilin pro mallojalajn mortigojn. Ili estas je dispono de la juĝisto Bertan de Quintana. En Tarragona estas enkarcerigitaj 50 k-doj. En Gerona 20 k en Lerida tiom.

La psukista partio plue praktikadas detenojn k arestojn de niaj k-doj, efektivigante tiele sian defenitivan k ekskluzivan aspiron semi kadavrojn. Ĝia ĉefcelo estas ekstermi tiujn, kiuj faris la revolucion k batis la faŝismon. Sed ni ne plu skribu, ĉar la ruĝa krajono de la cenzuronto dancos sur la liniojn, kiujn ni skribos... la universala opinio mem prijuĝu la sinceran antifaŝistecon k la aŭtentikan revoluciulecon de la katalunaj komunistoj de la etburĝa organizo P. S. U. C.

KYRALINA.

## ANARKIO

Vivu, vivu la Anarkio!
Ne plu sklaveco, perfort,
k kronite per gloro ni vivu,
aŭ ni iru kun gloro al mort.

Aŭdu, proletoj, la krion [sanktegan
por anarkio k solidarec,
aŭdu la bruon de bomboj [eksplodantaj
en defendo de la liberec.

La proleto suferanta proklamas
la Anarkion laŭlonge del [mondrand,
sian kapon kroninte per laŭroj
k la burĝaron metinte sub la [pland.

De la novaj martiroj la gloron
la murdistoj timas envii nun,
la grandeco eknestis sin en ties [brustojn,
ties parol tremigas ilin pro pun.

Al la lamento de ido plendanta:
donu panon, donu panon, panj,
respondegas la tero, tremante,
eligante la lafon el vulkan.

Revolucion! krias la proletoj.
Revolucion al la burĝaro sen [honest!
Revolucion! ripetas la herooj
de Ĉikago, Pariz k Jerez.

De unu polus ĝis la alia resonas
ĉi kriego al la burĝaro ĝis mort,
k la idoj ripetas en horo:
nia patrio, burĝar, estas la mond!

Tr. SAMULO.

La fasismo reprezentas k estas efektive la sociala malegaleco. Se vi ne volas, ke ni, kiuj batalas, ne kunmiksu vin, ariergardanoj, kun niaj malamikoj, plenumuvian devon.

DURRUTI

**NIAJ ABONANTOJ POVAS PAGI SIAN LAUVOLAN ABONKOTIZON AL LA JENAJ NIAJ PERANTOJ:**

**K-dino A. BOIS**
á MECÉ par VITRÉ
(ILLE-et-VILAINE) FRANCIO
Francoj, ne forgesu vialandan kotizejon!

**K-do Adr. PERSSON**
STADSHAGEN 13 - A
STOKHOLMO, SVEDIO
Svedoj, kotizu al privialanda peranto

**K-do T. C. KLIJN**
DAPPERSTR 123 - huis
AMSTERDAMO, NEDERLANDO
Nederlandanoj pagu lauvolan abonprezon al nia amsterdama peranto

La kotizontoj el la ceteraj landoj povas sendi sian kotizon k monhelpon al nia k-dino A. BOIS k k-do Adr. PERSSON kiuj estas niaj internaciaj geperantoj.

Anstataŭ sendi al ni responkuponojn, kotizu do rekte al niaj geperantoj.

La hispanaj abonpagontoj estas petataj sendi la monon rekte al ni per posta giro. Adreso por ili: «INFORMA BULTENO», Esperanto-fako, av. Durruti 32-34, Barcelono.

# PROMENEJO

"Sur Posteno" (n-ro 54) statistikante pri la agado de la Barcelona. I. P. E. - grupo, bombastas: "Aperis 10 n-roj de nia bulteno "Unueco". Ĝi estas la unua organo de esperantista organizo aperinta en Hispanio post la faŝisma ribelo". Ĉu? La unua n-ro de Buletin Información de C. N. T. estas datumita 25 de Julio 1936, t. e. 6 tagojn post la "faŝisma ribelo". Kiun daton surportas la unua n-ro de "Unueco"? Diru ĝin la k-doj de "Unueco". Tiel estus pli favore al ili. Ni atendas.

* * *

"Informoj pri Hispanio" (esperant-organo de P. S. U. C.) en n-ro de Junio emfazas: "La katalunaj kamparanoj ne volas kolektivigon". Ni legas k relegas la artikolon. K diable ne trovas manifeston, proteston de kamparanoj, kiuj malkontentu pri la kolektivigo. Sed la kolegoj mem de "Informoj pri Hispanio" de sur la skribtablo meditas dialektike: "La kataluna industrio ne estas nune en kondiĉoj havigi al la agrikulturo la modernajn maŝinojn bezonatajn, ĉar ĝi devas plenlabori por la milito. Ĝi ne povas doni al la agrikulturo traktorojn, ĉar ĝi devas fabriki armilojn. Ĉiu kolektivigo en tiuj ĉi kondiĉoj povas kaŭzi, almenaŭ en la unuaj momentoj, malpligrandigon de la produktkvanto".

K-doj de "Informoj pri Hispanio", se la kataluna industrio ne estas nune en kondiĉoj havigi al la agrikulturo la modernajn maŝinojn, ĉar "ĝi devas plenlabori por la milito", ili (la modernaj maŝinoj) estas havigeblaj el la eksterlando. K multaj jam estas havigitaj. K poste la kataluna industrio ne devas fabriki ekskluzive armilojn, sed, unkau, kvankam malmultajn, agrikulturajn maŝmojn modernajn por pliintensigi k pligrandigi la produktkvanton, kiu povus provizi la pligrandiĝintajn bezonojn de la fronto.

"Ĉiu kolektivigo en tiuj ĉi kondiĉoj" ne kaŭzis "almenaŭ en la unuaj momentoj malpligrandigon de la produktkvanton", sed tutmale pligrandigis ĝin per la liveritaj modernaj agrikulturaj maŝinoj. K dank al tio la fronto ne suferis pro manko de nutraĵoj, sed estis perfekte provizata. Cetere la pozitivajn rezultojn de la kolektivigo rekonas la k-doj mem de "Informoj pri Hispanio". Jen: "Ĝis nun la Kataluna registaro registris oficiale 66 kolektivojn. Ĉi cifero plejcerte ne reprezentas la tuton, sed la rezultoj atingitaj permesas doni konkretan impreson. Parto de tiuj kolektivoj kulturas terojn elproprigitajn el la faŝistoj k ili estas ekspluatataj komune de la kamparanoj. Ĉi iniciativon de la kamparanoj oni devas akcepti bone". Se estas tiel, do pro kio "la katalunaj kamparanoj ne volas la kolektivigon"? Ĉu "la katalunaj kamparanoj ne volas kolektivigon", aŭ la k-doj de "Informoj pri Hispanio"?

Sed estas alia tre rimarkinda frazo. "La kataluna kamparano, kiu estis devigata labori por majstro k kiu finfine alproprigis la teron neniel povas deziri, ke ĝi ree estu deprenita al li".

La kolektivigo de la tero sur la bazo de la libera komunismo ne signifas forpreni ĝin al la kamparano. Ĉar la kolektivo apartenas al la kamparanoj mem k "ĝi estas ekspluatata komune de la kamparanoj" Komprenehle se la kolektivo devas aparteni al la stato, "ĝi (la tero) estos ree deprenita al li".

Sed kvazaŭ la erarigo de "Informoj pri Hispanio" estas laŭsistema. Ĉar pli sube en la pritraktata artikolo ni legas: "Pli ol cent mil kamparanaj familioj estas organizitaj en la kataluna partio "Unio de Rabassaires". Aliaj 60000 kamparanoj estas organizitaj en la Federacio de la Terlaboristoj, aliĝinta al U. G. T. La C. N. T. havas malmultajn anojn ĉe la kamparana loĝantaro".

Ĉu vere? Sed estimata leganto k vi k-doj de "Informoj pri Hispanio", aŭskultu la oficialajn ciferojn.

La kataluna kaparana partio "Unio de Rabassaires" nombras 63000 anojn. Do ne pli ol cent mil. La Federacio de la Terlaboristoj, aliĝinta al U. G. T. nombras 33200. Do ne 60000. La kataluna Regiona Federacio de la katalunaj Kamparanoj, aliĝinta al C. N. T. nombras 115000. Do C. N. T. ne "havas malmultajn anojn ĉe la kataluna loĝantaro".

Ĉu ne? Respondu, k-doj de "Informoj pri Hispanio". Ni nur volas aldonis: antaŭ ĉio la veron! La veron! k-doj.

* * *

"Popola Fronto" (n-ro 18) direktante "amikan atentigon" k klarigante, ke "la stranga sinteno de P. O. U. M. kulminis en la absurda revolucia ribelo en Katalunio la 4 de pasinta Majo", konigas:

"Per maloportunaj postuloj, celantaj laŭdire la starigon de fronto ekstreme revolucia, ĝi subfosadis la unuiĝon de diversaj branĉoj el la antifaŝismo."

K post kelkaj linioj ni trovas:

"Spionado serve al la faŝismo."

Unue oni akuzas pro "maloportunaj postuloj, celantaj la starigon de fronto ekstreme revolucia" k poste pro "spionado serve al la faŝistoj".

Kiel estas klarigebla ĉi kontraŭdiro? Ĉu vortludo? Ĉu misa vortkombinaĵo? Eble.

* * *

En la sama n-ro de "Popola Fronto" ni trovas apartan aldonon "Vortoj al k-do Lanti". Ni citu kelkajn el ĝiaj bibliecaj aforismoj, kiaj tiom abundas en ĝi, aldonante niajn komentojn.

"Ni, sennaciistoj, celas la starigon de unu sola lingvo tutmonda"...

La sennaciistoj, k-do, celas ne nur "la starigon de unusola lingvo tutmonda", sed ankaŭ la starigon de sennaciismo. Pro tio nome ni estas sennaciistoj.

"Patriotismo en Sovetio ne estas danĝera al alia popolo."

Sekve oni povas paroli pri danĝera k maldanĝera patriotismo. Nu tion ni ankoraŭ ne sciis. Malpatriotan dankon!

"Malfortigi la nacian senton de la popolo en la nomo de la bono de la Socialismo estus neniel utila al la intereso de la laborista klaso tutmonda."

Ĉu vi aŭskultas, laboristoj? "Malfortigi la nacian senton de la popolo en la nomo de la bono de la Socialismo estus neniel utila al la intereso" de via klaso. Do fariĝu naci-socialistoj k legu ĝentile "Mein Kampf".

"Tiom longe, kiom S. A. T. restos influata de siaj propraj limigaj kondiĉoj, ĝi ne povos trairi la vojon de la unueco. Dum ĝi konservos sian sennaciecan strukturon (tute neutila de praktika vidpunkto, kvankam tre ĝusta kiel idealo por la estonto) la frakcioj havas en ĝi nenian lokon."

Diable, tiu spitema S. A. T. pro kio ne volas malkonservi "sian sennaciecan strukturon", agnoskante, ke "la patriotismo en Sovetio ne estas danĝera al alia popolo" k ke "malfortigi la nacian senton de la popolo" en la nomo de la bono de la Socialismo estus neniel utila al la intereso de la laborista klaso tutmonda? Tiam ja ĝia sennacieca strukturo ne estus "tute neutila de praktika vidpunkto, kvankam tre ĝusta kiel idealo por la estonto".

"Ili (la frakcioj) havas sian lokon ekster S. A. T., en kiu ili estas simplaj gastoj -krom la sennaciista frakcio (konsistigata de revemuloj, ne de klasbatalemaj proletoj)

kiu estas la sola prave kuŝanta en la lulilo de sennacieco, kies ortodoksa ido ĝi estas."

Ĉu "revemuloj" konsistigas la sennaciistan frakcion, "kiu estas la sola prave kuŝanta en la lulio de sennacieco"?

La aŭtoro mem donas respondon:

"Ili — la sennaciistoj — (asertas la Manifesto) tamen ne kredas, ke ĉiuj homoj povos baldaŭ akiri menson, en kiu superregos la racio."

Ĉar la aŭtoro de la ĵus cititaj sentencoj estas S. A. T.-ano (eble ankaŭ I. P. E.-ano, ne gravas) ni supozas ke li volas fariĝi protagonisto de nova doktrino — Nacieca Sennaciismo.

"Jen niaj konkludoj."

Jā:

"Ni estus mallojalaj al nia konscienco, se ni ne eldirus ĉion, kion vi ĵus legis, k-doj." PARIO

## TRE GRAVA

Ni avizas al ĉiuj organizoj, komitatoj, ateneoj, societoj kulturaj k unuopuloj, kiuj deziras helpi la hispanan anarkisman k anarkosindikistan movadon ne sendi monon al la adreso de A. Ganin.

Estonte sendu monon al la sekvanta adreso: Nemesio Calve, 30, rue Saint Augustin, Paris, 2.

Ankaŭ ni petas la gazetojn represi la novan adreson de C. N. T. k F. A. I. k doni la maksimuman publikecon de la nova adreso.

*La Nacia Komitato de C. N. T.*
*La Duoninsula Komitato de F. A. I.*

* * *

De 1 ĝis 12 de Septembro la Barcelona esperantistaro arangas grandiozan esperantan ekspozicion antifaŝisman. Gin partoprenos ĉiuj Barcelonaj esperantistaj societoj k grupiĝoj. Estos ekspoziciataj ĉiuspecaj esperantaĵoj. La internacia esperantistaro estas petata hepli ekspozicion. La ekspozicio havas duoblan celon por esperanto propagandi kontraŭ faŝismo k por la laborista esperantismo. Ĉion sendu al adreso: MONTSERRAT, str. PROVENZA, 75, III, Barcelono.

* * *

Preseraro. En la pasinta n-ro de "I. B." la frazo "Saluto de Gasto dediĉita al la 8 S. A. T.-kongreso" estu legata Saluto de Gasto dediĉita al la 14 S. A. T.-kongraso.

* * *

Ni petas la k-dojn, kiuj sendas leterojn al ni, skribi se ne maŝine almenaŭ pli legeble. Aparte la adreso estu notita klare k legeble. Tio evitigos al ni ne nur tempoperdon, sed ankaŭ kapturniĝon. Oni ja konsideru, ke ni ne disponas liberan tempon por deĉifri.

* * *

K-dino M. PANĈEVA el Sofio estas petata skribi al k-do Al Halas, ROZSEC, MORAVA; ĈEHOSLOVAKIO.

* * *

Oni petas informojn pri Miguel Calzada Ortega aŭ ties samfamiliano e Valmaseda. Turnu sin al k-do Jarrossaj, 101, rue Nationale, CHOLET (M-et-L) FRANCIO.

* * *

Grupo da lernantoj deziras korespondi per p. i. kun ĉiuj landoj. Adreso: Sección de Esperanto, Juventudes Libertarias de Horta, str. Castellón 2, Barcelono.

* * *

Korespodenca Centro Internacia, Helmerstraat, 22, Amsterdamo, Nederlando, havigas ĉiuspecajn korespondadresojn al la ĉiulandaj esperantistoj pri ĉiuj temoj. Petu detalojn.

## LETERUJO

F. I. J. L.—Borjas Blancas. La kotizon sendu per poŝta ĝiro.

Dik van Rijn.—Vijfhuizen. Ni alsendas propagandilojn. Koncerne korespondanton—nu vi povas profiti la adreson anoncatan en ĉi nro.

Nils Lait.—Fabara. Jes, k-doj, ĉiuj preĝejoj, kiuj ne taŭgas, devas esti malkonstruitaj k el ties materialo konstrui lernejojn, hospitalojn, teatrojn ktp. Dio ne ekzistas k neniam li ekzistis. Aŭ pli bone, li ekzistis en la malsanamucida fantazio de iuj.—Se vi bezonas lernolibrojn por la fondota Esperanto-kurso, ni sendos.

V. Marti.—Vic. Sciigu al via sovetia k-do, ke ni regule sendas al li nian bultenon. Se li ne ricevas ĝin, eble estas afero de la cenzuro.

Ulbon.—Alikante. Elkoran dankon pri la interesplena letero. K aparte Pario dankas vin. Ni sendos petatan literaturaĵon. Tamen ne forgesu nin. Pario rezervos por vi sengage almenaŭ unukolonon. Aŭ iu ineto militkaptis vian koreton.

G. Plateu.—Kasba-Tabla. K-do, ĉe Aragon-fronto oni ne atakas k ne povas ataki, ĉar la milicanoj ne estas provizitaj per sufiĉaj bataliloj: aviadiloj, tankoj, ktp. Pro obstrukcoj. K poste ja ekzistas unika supera komando. La petatan materialon ni prizorgos sendi.

B. C.—Bulg. Esperantlingvan statuton pri C. N. T. k F. A. I. ni ne havas. Eble baldaŭ havos.

W. Adrians. — Rotterdamo. Dankon pri la alsenditaj gazetaj detranĉaĵoj.

H. Johansson. — Goteborg. Dankon pro la res. kup.

J. S. — Gem. Odoorn. Kompreneble ne estas superlendenca, des malpli superpartia. Tion vi mem povas konstati el ties enhavo.

A.—Bresto. Vi ricevados "Solidaridad Obrera". La listo de pridemandatoj ni transdonos al "S. O." por publikigo en la milicana rubriko.

Jean Parmentier.—Brain. Dankon pri la res. kup.

Al. Halas.—La respondaro ricevita. La petatajn librojn ni sinsekve alsendos. Ni klopodos pri la regula ricevado de la menciitaj gazetoj. La anoncon ni publikigos. La letero transdonita. Ni salutas vin pro via agado!

Miguel Belma.—Fronto de Aragon. La petataj esperantaĵoj estas haveblaj ĉe Montserrat, str. Provenza, 75, III, Barcelono.

T. Jamaga.—Tokio. Dankon pro la mono.

J. Kruissiuk.—Bussum. Nian kondolencon pro la morto de via familiano!

Jozefo Ĝiol. — Barcelono. La sendita artikolo ne prezentas sufiĉan intereson por nia internacia legantaro. Sendu pli konkretan materialon.

Sten Carlsson.—Stromsnasbruk. Elkoran dankon pri la alsenditaj libroj!

Ni petas la redakciojn, al kiuj ni sendadas "Informa Bulletenon" interŝanĝe sendadi siajn eldonojn.

ESPERANTO PRES-SERVO DE I. L. E. S.
(Iberia Ligo de Esperantistoj Senstatanaj)

**Presejo „Liberecana Kulturo"**
**str. Salmeron 241, Barcelona**